N I A   V O Ĉ O
Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz
MAYO 1994

**DANKON AL CARMEN SUÁREZ, KIU BINDIGIS LA KOLEKTON DE "NIA VOĈO"**

## RONDA TABULO

Pedro Vilaroig partoprenis, ĉe Fakultato de Informadaj Sciencoj, en ciklo de prelegoj pri mondaj interkomunikadaj problemoj. Li kompreneble faris propagandon de la libro "Esperanto: fenómeno de la comunicación" kiun eldonis Liceo pasintjare.

## INTERESO PRI "Historio de Esperanto en Madrido"

Liceo ricevis du petojn de ne-esperantaj librovendejoj. La libro, verkita de Lupe Sanz, hispane kaj esperante, aperis en komputila katalogo de novaĵoj por librovendejoj.

## INTERNACIE

Kelkaj mallongigoj devas esti uzata kiel esperanto, internacie, ekzemplo: (ĉiuj sen punkto kaj sen pluralo).

HISPANIO = ES kiel devas aperi antaŭ la poŝt-kodo. ES-29012.(UNE 1084 <> ISO 3166)
PESETO/J = PTA    DOLARO/J = $    GULDENO/J= Df (UNE 1080)
DATO = jj-mm-tt  1994-12-15 (UNE 1143 <> ISO 8601)
METRO/J = m KILO/J = kg    SEKUNDO/J = s  (UNE 5002 <> ISO 1000)

## UEA MEMBROJ KAJ FINACOJ

Hispana membraro de UEA en 1993 estis 511 aliĝintaj membroj kaj 759 individuaj: sume 759. Entute UEA havas 24.524 membroj en 115 landoj.
Laŭ informo de UEA, en 1993 la membraro falis (28.293 en 1992).

La redakcio de "Nia voĉo" ne havas novaĵon pri la parto de la profito de UK-Valencio kiu devas ricevi Valencia Esperanto-grupo kaj HEF. Iu scias ion?. Katalunoj, kiuj organizis antaŭ-kongreson en Barcelono, administris rekte la monon kaj ili prezentis kontojn al UEA, ne kontraŭe, sed en UK, UEA ne permesis fari tion.

## NOVA VERKO DE KAMAĈO

Aperis dua eldono de "La Majstro kaj Martinelli", satira novelo de Georgo Kamaĉo. La eldonisto prezentas ĝin jene: en ĉi verko, lingvo-tavoloj egalas al ĵongla aŭtora stil-ekzerco kaj-eble unuafoje en nia originala literaturo-groteska troigo kaj karikatura misformo ricevas beletran valoron. Eldonas ILTIS (Germanujo). Vendas Libroservo de HEF po 925 Pta.

## PREPARU MALAGAN KONGRESON

En Malago okazos kunveno de reprezentantoj de Hispanaj esperantaj grupoj por pridiskuti celojn, planojn kaj estonton de HEF kaj de la hispana movado, legu numeron 314 de "Boletín" kaj sendu komentariojn al HEF-Sekretario. ESTAS GRAVA

## EL HISPANIO

José González daŭrigas la laboron ĉe la Universitato de Ekstremaduro, li finos duan nivelan kurson en Badajoz kaj preparas bazan kurson en Huelva dum la somero. ANTAŬEN José.
Augusto Casquero estis invitita, kiel pasintjare, al la Internacia Simpozio en Bydgoszcz (Pollando). La temo estos "La rolo de la kulturo en la integriĝo de Eŭropo kaj de la mondo"

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4º:

16-an de majo.- "Gigantoj de Madrido". Prelegas Carmen Suárez
20-an junio.- "Bankoj kaj bankistoj". Pedro Garrote

**KONGRESOJ**

13-20a de majo en Krems (Austrio) 46a Fervojista Kongreso
16-21a de julio en Málaga, 53a Hispana Kongreso de Esperanto

**HEF ANGULO aŭ MEL sugestas**

Dum aprilo MEL sugestis al HEF, pere de aŭtomata respondilo, sendi salut-leteron al X Congreso de Academias de la Lengua kiu okazis en Madrido je la mezo de aprilo. Ankaŭ oferis 500 propagandajn flugfoliojn por disdoni en EXPOLINGUA-94 (Madrido-aprilo 1994) Bedaŭrinde HEF ne povas pagis giĉeton (proksimume 300.000 pta) en tiu-ci lingva ferio por fari propagandon de la internacia lingvo

MEL sugestas, daŭrigante en la temo de la raporto pri aktivaĵoj de 1993, ke ĉiuj grupoj kiuj apartenas al HEF sendu siajn 1993-informojn por kunigi kaj inkludi en HEF raporto, sed... atentu sekretario!, ne faru kiel pasintjare kun la libro "Esperanto: fenómeno .." kiu aperis kiel atingo de HEF, sed diru: la loka grupo MEL eldonis "E-o..", aŭ: jenaj grupoj aranĝis esperantajn kursojn, BEC, KEA, ktp. Oficiale MEL kritikis tiun aferon kaj petis korekti informon (almenaŭ en BOLETIN ne aperis tiu korektado nek komentarioj al protokolo kiuj ankaŭ sendis MEL al HEF-sekretario.

MEL oferas sian preleg-tagon de junio (20-an) al HEF por antaŭprepari kunvenon de lokaj grupoj en Malago kaj antaŭdiskuti ricevitajn komentojn por faciligi la laboron dum la Kongreso.

AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato por pli ol 5 ekzempleroj. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4º. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON.

Denove la Papo salutis dum Pasko en Esperanto al pilgrimantoj kiuj estis en la placo de Sankto Petro kaj per TV kaj radio al ĉiuj bon-volontaj homoj, ekzemple, César kiu aŭskultis radie la elsendon.

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

VENAS SOMERO
Aĉetu MEL-T ĉemizojn kun verda stelo ĉirkaŭita de la vorto ESPERANTO.
Prezo 600 pta plus sendokosto
20% rabato por pli ol 20.

ESPERANTO LICEO DE MADRID Atocha 98-4º 28012 Madrid